WIKIPEDIA

Vjetnama lingvo

La **vjetnama lingvo** (vjetname: *Tiếng Việt*), tona lingvo, estas la lingvo oficiala de Vjetnamujo. Ĝi estas la lingvo denaska de 87% de la loĝantaro Vjetnama, kaj ankaŭ de ĉirkaŭ du milionoj de Vjetnamoj elmigrintaj. Kvankam ĝi enhavas vortojn multajn pruntitajn de la ĉina kaj antaŭtempe oni skribis ĝin per la Hana skribo, lingvistoj konsideras ĝin kiel unu el la Aŭstralazia lingvaro, el kiuj ĝi havas la plej parolantaron grandan (la dua plej granda, tiu de la kmera lingvo, estas nur dekono de la Vjetnama).

Vjetnama lingvo	
Tiếng Việt	
Parolantoj	68 058 620
Skribo	alfabeto de vjetnama lingvo, Ĉin-Vjetnama skribo, vjetnamlingva brajlo
Lingvistika klasifiko	
Aŭstralazia	
Mon-Kmera	
Vjet-Muonga	
Vjetnama	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Vjetnamio
Lingva statuso	1 sekura
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	vi
ISO 639-2	vie
ISO 639-3	vie
SIL	VIE
Glottolog	viet1252
Angla nomo	Vietnamese
Franca nomo	vietnamien

Enhavo

Klasifiko

Geografia distribuo
- Oficialeco
- Dialektoj

Sonoj
- Vokaloj
- Konsonantoj

Gramatiko

Leksikono

Ortografio
- Historio
- Ekzempla Teksto

Tonoj

Komputilaj aspektoj

Vjetnama literaturo en Esperanto

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Referencoj

Klasifiko

La vjetnama estas ano de la Vjet-muonga sublingvaro de la mon-kmera branĉo de la Aŭstralazia lingvaro, familio kiu ankaŭ inkluzivas la kmeran lingvon de Kamboĝo.

Geografia distribuo

Laŭ Ethnologue, la vjetnama estas ankaŭ parolata en Aŭstralio, Kamboĝo, Kanado, Ĉinio, Ebur-Bordo, Finnlando, Francio, Germanio, Laoso, Martiniko, Nederlando, Nov-Kaledonio, Norvegio, Filipinoj, Senegalo, Tajlando, Unuiĝinta Reĝlando de Britio kaj Nord-Irlando, Usono, kaj Vanuatuo.

Oficialeco

La vjetnama estas la oficiala lingvo de Vjetnamujo.

Dialektoj

Estas dialektoj multaj interkompremenlaj de la vjetnama. La ĉefaj tri estas la Norda Vjetnama (Hanoja dialekto), Centra Vjetnama (Hue-a dialekto), kaj Suda Vjetnama (Sajgona dialekto).

Ili malsametas tone, sed la Hue-a dialekto estas iel pli malsama ol la aliaj. La tonoj hỏi kaj ngã estas pli distingeblaj en la norda dialekto ol en la suda. La nuna norma elparolo kaj ortografio estas bazata je la dialekto de kleraj parolantoj en Hanojo.

Sonoj

La ĉi-postaj tabeloj priskribas la vjetnamajn fonemojn uzante la Internacian Fonetikan Alfabeton.

Vokaloj

Malvastaj malantaŭaj vokaloj havas rondigon kiel distingaĵo.

	Front	**Central**	**Back**
Centering	*ia~iê* [iə̯]	*ứa~ươ* [ɨə̯]	*ua~uô* [uə̯]
Close	*i/y* [i]	*ư* [ɨ]	*u* [u]
Close-mid/ Mid	*ê* [e]	*ơ* [ə˕] *â* [ə]	*ô* [o]
Open-mid/ Open	*e* [ɛ]	*a* [a˕] *ă* [a]	*o* [ɔ]

Konsonantoj

	Bilabiala	Alveola	Retrofleksa	Palatala	Velara	Glotala
Plozivo	p/b	t/d, [tʰ]*	ʈ	c	k	
Frikativo	f/v	s/z	ʂ/ʐ	ɟ	x	h
Nazalo	m	n		ɲ	ŋ	
Likvido		l				

* / tʰ / estas senvoĉa, aspiraciata alveola plozivo

Gramatiko

La vjetnama lingvo, kiel la ĉina kaj la havaja, estas izoliga lingvo, t.e. ĝi ĉefe esprimas konceptojn po unu morfemo je ĉiu vorto, kaj ne, kiel aglutinaj kaj fleksiaj lingvoj, per multamorfemaj vortoj. Ĝia vortordo estas Subjekto Verbo Objekto.

Leksikono

La plejparto de la vjetnama leksikono elvenas de la ĉina. Fakte, dum miljaroj (ĝis 1945) la vjetnaman oni skribis per ĉinaj signoj. Antaŭ ĉirkaŭ mil jaroj, la Vjetnamo vere estis parto de Ĉinio. Ankaŭ, la vjetnama havas kelke da franca leksikono laŭ la pli nova historio de Hindoĉinio.

Ortografio

Nuntempe, la skribata lingvo uzas la **vjetnaman alfabeton** [vjetname: *(Chữ)* ***Quốc Ngữ***; laŭvorte "(skribo de) la nacia lingvo"]; tio estas atribuita al Alexandre de Rhodes. Tio uzas la latinan skribsistemon bazita sur sia uzado en la alfabetoj de latinida lingvaro,[1] speciale la portugala,[2] kun kelkaj digrafoj kaj la aldono de naŭ diakritsignoj - kvar el ili por krei aldonajn sonojn, kaj la aliaj kvin por indiki la tonon de ĉiu vokalo. La multaj diakritoj, ofte du sur la sama litero, rekonebligas skribitan vjetnaman facile.[3]

Quốc Ngữ (Vjetnama alfabeto)

Litero	Nomo	Nomo per IFA	Valoro per IFA	Proksima prononco
A a	a	[aː˧]	[aː], en iuj dialektoj: [æ]	a
Ă ă	á	[aː˥]	[a]	a
Â â	ớ	[ɤː˥]	[ɤ]	(vokalo proksima al ŝvao)
B b	bê; bờ	[ɓe˧]	[ɓ], ʔb	b streĉa
C c	xê; cờ	[se˧]	Ne antaŭ *I*, *Ê*, *E*. [k]/[k̟], [k͡p̟] post *O*, *Ô*, *U*	k
D d	dê; dờ	[ze˧]	norde: [z], sude: [j]	z, j
Đ đ	đê; đờ	[ɗe˧]	[ɗ], [ʔd]	d streĉa
E e	e	[ɛ˧]	[ɛ]	e malferma
Ê ê	ê	[e˧]	[e]	e ferma
G g	giê; gờ; ghê	[ʒe˧]	[ɣ]	g frikativata
H h	hắt; hờ	[hat˥]	[h]	h
I i	i; i ngắn	[i˧]	[i]	i
K k	ca	Antaŭ *I*, *Ê*, *E*. [kaː˧]	[k]	k
L l	e-lờ; lờ	[ɛ˧ləː˨˩]	[l]	l
M m	em-mờ;em; mờ	[ɛm˧məː˨˩]	[m]	m
N n	en-nờ; en; nờ	[ɛn˧nəː˨˨]	[n]	n
O o	o	[ɔ˧]	[ɔ]	o ferma
Ô ô	ô	[o˧]	[o]	o ronda
Ơ ơ	ơ	[ɤː˧]	[ɤː]	(kiel ŝvao)
P p	pê; pờ; bê phở	[pe˧]	[p]/[p̟]	p
Q q	cu; quy; qu	[ku˧]	*QU*: norde: [kw], sude: [w]	kŭ, ŭ
R r	e-rờ; rờ	[ɛ˧ʐəː˨˩]	norde: [ʐ], sude: [ɻ], [ɹ]	z, ĵ, r
S s	ét; sờ; xờ mạnh; xờ nặng	[ɛt˥]	norde: [s], sude kaj centre: [ʂ]	s, ŝ
T t	tê; tờ	[te˧]	[t]/[t̟]	t
U u	u	[u˧]	[u]	u ronda
Ư ư	ư	[ɯ˧]	[ɯ]	u neronda
V v	vê, vờ	[ve˧]	norde: [v], sude : [j]	v, j
X x	ích; xờ; xờ nhẹ	[ik˥]	[s]	s
Y y	i dài; i-cờ-rét	[i˧zaːj˨˩]	[i]	i

Duobla konsonantoj

- *GI*: same al *D*.
- *GH*: same al *G*. *GH* estas literumata antaŭ *I*, *Ê*, *E*.
- *QU*: vidu la tabelon.
- *CH*: [c] aŭ [tɕ] (kiel Esperanta "ĉ"). En la fino de silabo, norde [[ʲk̟]] (kiel "jk" ne-ellasata), sude same al *T*.

- *KH*: norde [x] (kiel "x"), sude [kʰ] (kiel "kh").
- *NG*: [ŋ] (kiel "ng"), [ŋ͡m] post *O*, *Ô*, *U*. Ĝi estas literumata kiel *NGH* antaŭ "i", "ê", "e".
- *NH*: [ɲ] (kiel "nj"). En la fino de silabo, norde [[ʲŋ]] (kiel "jng"), sude [n] (kiel "n").
- *PH*: same al *F*. Fakte, *PH* estas uzata multe pli ol *F*.
- *TH*: [tʰ] (kiel "th").
- *TR*: norde same al *CH*, sude [[tʂ]] (kiel "cr").

Historio

Origine latinigo de la vjetnama, ĝin kreis en la 17-a jarcento franca jezuita misiisto nomiĝinta Alexandre de Rhodes (1591 ĝis 1660), bazanta ĝin je skribaĵoj de pasintaj portugalaj misiistoj. Dum la franca okupo de la 19-a jarcento, ĝi populariĝis kaj dum la 20-a jarcento preskaŭ ĉia skribaĵo ŝanĝiĝis al *quốc ngữ*.

Antaŭ la franca okupo, la unuaj du vjetnamaj skribsistemoj estis bazataj je la Hana skribo:

- la norma ideografia ĉina simbolaro nomata ***chữ nho*** ("klerulaj simboloj", 字儒) antaŭe estis uzata por skribi la literaturan ĉinan lingvon.
- malsimpla variaĵo, ***chữ nôm***, ("sudaj/vulgaraj simboloj", 字喃) kun simboloj kiuj ne ankaŭ ekzistis en la ĉina simbolaro; tiu sistemo pli bone taŭgis la unikajn fonetikajn trajtojn de la vjetnama kiuj malsamis al la ĉina.

La aŭtentika ĉina skribo, *chữ nho*, estis pli komune uzata, tamen *chữ nôm* estis uzata de kleruloj (oni devas povi legi *chữ nho* por legi *chữ nôm*). Ambaŭ la du skriboj malkomuniĝis el uzo en moderna Vjetnamujo, kaj *chữ nôm* preskaŭ malaperas.

Ekzempla Teksto

Ĉi tiu teksto elvenas el la unuaj ses linioj de *Kim Vân Kiều*, epopeo de la fama poeto Nguyễn Du, 阮攸; (1765 ĝis 1820). Ĝi originale estis skribita per la skribo *chữ nôm* (titolita 金雲翹), kaj ankoraŭ estas ofte studata en Vjetnamio.

Chữ nôm		Vjetnama Alfabeto	Esperanta Traduko
□□□□□嗟 □才□命窖羅恄饒 □戈沒局□桃 仍調□□罵忉疸□ 邏之彼嗇私豐 □青慣退□紅打慳	𦤎蘚𩞁墜𠀧嗟 𡨸才𡨸命窖羅恄饒 𢧐戈沒局澈桃 仍調𩣡覽罵忉疸悉 邏之彼嗇私豐 歪青慣退鴄紅打慳	Trăm năm, trong cõi người ta, Chữ tài, chữ mệnh, khéo là ghét nhau. Trải qua một cuộc bể dâu, Những điều trông thấy mà đau đớn lòng; Lạ gì bỉ sắc, tư phong, Trời xanh quen thói má hồng đánh ghen.	Cent jaroj, en tiu mallonga periodo de homa vivo, Talento kaj Destino konfliktegas. Oceanoj fariĝas moruskampoj: dezerta sceno! Pli da donaĵoj, malpli da ŝanco, tiel estas la leĝo de Naturo Kaj oni scias ke la blua ĉielo ĵaluzemas pri rozkoloraj vangoj.

Tonoj

La ses tonoj de la vjetnama estas:



Tonoj de la vjetnama. La norda dialekto (maldekstre) kaj la suda (dekstre)

Tona nomo	Priskribo	diakritilo	Tona konturo	Ekzemplo	Traduko
Ngang	sen tono	(sen marko)	˧ (33) 🔊 a	*ma*	truo
Sắc	altiĝas	Dekstra korno	˥ (35) 🔊 á	*má*	patrino
Huyền	malaltiĝas	Maldekstra korno	˨˩ (21) aŭ (31) 🔊 à	*mà*	trompi
Hỏi	malaltiĝas, realtiĝas	Hoko	˧˩˧ (313) aŭ (323) aŭ (31) 🔊 ả	*mả*	tombejo
Ngã	ekmalaltiĝas, realtiĝas	Tildo	Norde ˧ˀ˥ (3ˀ5) aŭ (4ˀ5) 🔊 ã; Sude same al *Hỏi*	*mã*	ĉevalo
Nặng	malalta, glotala	Subpunkto	˧ˀ˧ʔ (3ˀ2ʔ) aŭ ˧ˀ˨˩ʔ (3ˀ1ʔ) 🔊 ạ	*mạ*	plantido de rizo

Oni skribas tonajn diakritilojn ĉiam super ĝia vokalo, krom Nặng, kiu estas punkto metata sub la vokalo. Ekzemple, la komuna familinomo *Nguyễn* komenciĝas per la sono /ŋ/ (la *ng* de la angla, germana, kaj sveda vortoj *Ri**ng***), kaj sekvas io simila al "ŭen". La ˜ signifas la tonon ngã, kiu komenciĝas malalte, plimaltaltiĝas, kaj fine altiĝas al la fino de la vorto.

Kiel multaj lingvoj, la vjetnama, origine unusilaba lingvo, kiel videbla en ĝia riĉa tonsistemo kaj silabaj diftongoj kaj triftongoj kiuj intencas distingi inter unusilabaj vortoj, nun estas multasilaba lingvo, klare videbla pro la fakto ke pli ol duono de ĝia abunda leksikono estas multasilabaj kaj kunmetitaj vortoj.

Komputilaj aspektoj

Unikodo enhavas ĉiun literon necesan por skribi la vjetnaman, do en la Esperanta Vikipedio oni povas simple enmeti la ĝustajn unikodajn literojn.

Ekzistas ankaŭ multaj kodpaĝoj kiuj intencas montri vjetnamlingvajn tekstojn, kiel VISCII kaj CP1258.

Kie oni devas uzi ASCII-on, oni ofte uzas la VIQR-sistemon.

Vjetnama literaturo en Esperanto

- Fremdlingva Eldonejo (Hanojo)
- Esperanto-movado en Vjetnamio

Vidu ankaŭ

- Esperantigo de vortoj el vjetnama fonto

Eksteraj ligiloj

- Vietnamese 101 (http://www.101languages.net/vietnamese/) Learn Vietnamese online

Referencoj

1. ↑ Haudricourt, André-Georges. 2010. *The Origin of the Peculiarities of the Vietnamese Alphabet (http://academia.edu/2571111/_The_origin_of_the_peculiarities_of_the_Vietnamese_alphabet_translation_of_an_article_by_Andre-Georges_Haudricourt).* Mon-Khmer Studies 39: 89–104. (Angle)
2. ↑ Roland Jacques (2002). Portuguese pioneers of Vietnamese linguistics prior to 1650 (http://www.orchidbooks.com/book_reviews/port_pioneer.html). Orchid Press. (Angle)
3. ↑ Jakob Rupert Friederichsen. 2009. *Opening Up Knowledge Production Through Participatory Research?* Frankfurt. Page 126. (Angle)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Vjetnama_lingvo&oldid=6684415"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:00, 16 aŭg. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.